



# The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 2 No. 3

Official Organ of the Esperanto League for North America

May-June, 1954

## ESPERANTO: A LIVING LANGUAGE

We Esperantists like to say we speak "the living language of a living people" and seldom if ever refer to Esperanto as "artificial". On the other hand, criticism of the International Language is almost universally based on the premise that, because Esperanto is "artificial", it is therefore not to be taken seriously; even, in some cases, people who should know better have said that because Esperanto is "artificial" it is not a language at all.

And so we are faced with a theory, which we may state as follows: "Language is a natural phenomenon. It is continuously changing to keep pace with the nature and needs of the human race, and its state at any moment reflects the total of human experience from the beginning of man's existence to that moment. A language is therefore much more than a mere tabulation of words and grammar; it is an integral part of the culture of a specific people; it has an inner spirit which sets it apart and identifies it with the people who produced it. As such it can only be born of human experience; it can never be "created" by man."

Now this is a beautiful theory and not at all illogical. If you suppose that, as an Esperantist, I must attack this theory and attempt to show that it is false, you are wrong. I see no conflict between it and the fact of Esperanto's success. On the contrary; it explains

why Esperanto alone, of all the hundreds of proposed "auxiliary languages", has taken roots and assumed a permanent, dynamic role in the society of today's world.

To understand the genius of Esperanto we must look to the genius of its author, Dr. L. L. Zamenhof. An authority on languages, he was no "language doctor", regarding the subject with the cold impassivity of the scientist. He was a man of sympathetic emotions, who cherished a deep love for humanity and in whose soul burned one great desire: to end the suspicions and hatreds, born of misunderstanding, which exist between peoples speaking different languages; to tear down the Tower of Babel and to stamp out forever its curse. Such a man was able to recognize that the real problem in the creation of a new language would not be the selection of its vocabulary or the formulating of a grammar; the problem was to breathe into the language a living spirit; to gather around it disciples in whose loving care the

new language would take root, grow, and flourish. And this he succeeded in doing through the sheer power of a compelling personality and a devotion to his ideal which continued to his last moment on earth. Adored by the early apostles of "Dr. Esperanto's language"\*, he succeeded in establishing a new society, which continues to exist today, after more than sixty years. It is a people held together by two bonds: a common language, and an ideal. To the Esperantists of today, both of these things represent a *heritage*, just as the language and spirit of America are inherited by each new American.

We are of many nations, many races, many religions; but we are all members of the human race and brothers of one another. Esperanto brings us closer together, instills in us a greater sense of oneness, heightens our love for fellow man. It is this spirit, this ideal sometimes called the "internal idea" of Esperanto which sets the Esperanto movement completely apart from any mere language project. This is what makes Esperanto "*the living language of a living people*".

D. B. R.

*Because of a last-minute change in Congress plans, this issue was delayed briefly. Be sure to read about the Congress on page 2.*

\* When Dr. Zamenhof first published his International Language he signed it with the pseudonym "Dr. Esperanto" (one who hopes), from which the present name was later taken.

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

**Addresses:** Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Financial Secretary. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the General Secretary of the League. Send literary contributions, news items, etc., to the Editor: David B. Richardson, 6205 So. Prospect, Tacoma 9, Wash.

**Deadlines:** The Review is placed in the mails prior to the 15th of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. **President:** Gilbert Nickel, 204 Harding Ave., Silver 4, Del.; **Vice-President:** John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 4, New York; **General Secretary:** Louis Dormont, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N.Y.; **Financial Secretary:** Conrad Fisher, R.F.D. 1, Meadville, Pa.; **Treasurer:** Edward W. Pharo, Jr., 638 Rosalie St., Philadelphia, Pa.; **Chairman, Executive Board:** F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

The work of the League is carried on largely by four standing subcommittees of the Executive Committee:

**Finance:** George E. Wagner, 403 E. North St., Tampa, Fla.

**Organization:** Armin F. Doneis, P.O. Box 105, Pharr, Tex.; Roan Orloff, 31 Nahanton St., Box 18, Newton Center 59, Mass.

**Publicity:** Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Ore.; Helene Wolff, 2944 Clay St., San Francisco, Calif.

**Education:** W. G. Adams, Kingston, Wash.; G. G. Iggers, Philander Smith College, Little Rock, Ark.; John Bovit, 132 East Broad St., Westfield, N. J.

Anyone who can help in the work of one of these committees, or who wants help on local problems, is requested to write to the first name listed under the committee concerned.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

**Membership Dues:** Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."



## ESPERANTO KONGRESO

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Princeton, N.J.

July 9, 10, 11, 1954

### Location

Please note this important change in plans. The Congress will *not* be held at Westminster Choir College, as previously announced.

Specific details regarding the location are being sent directly to those who have signed up as Congress members. Anyone arriving at Princeton without having received such instructions can get transportation to the Congress by telephoning Mr. Borden.

### Program

**Friday, July 9:** Registration and afternoon sightseeing. Social evening with entertainment in Esperanto.

**Saturday, July 10:** Major business meetings morning and afternoon. Reading of reports of ELNA's officers and Estraro. Banquet in the evening.

**Sunday, July 11:** Morning religious services conducted in Esperanto. Sightseeing in the early afternoon, followed by final business meeting and dissolution.

### Registration

It is not too late to register for the Congress if you hurry. Send \$3 registration fee to Local Congress Committee Chairman Howard G. Borden, 110 S. Overbrook Ave., Trenton 8, N. J.

VIVU  
la Internacia Lingvo!

## EXECUTIVE BOARD DECISIONS

1. Added \$100 to funds budgeted to the Review for Jan.-Aug., 1954.

2. All donations made specifically for the Review shall be placed at the disposal of the Editor as an addition to sums provided from the treasury.

## NI BEDAURE ANONGAS

ke du malnovaj batalintoj por nia afero foriris al tiu lando, de kie neniu homo revenas.

John Bovit, ELNA-ano n-ro 1, kaj membro de nia Estraro, demetis la pezan ŝarĝon de siaj multjaraj laboroj por homaraj je la 12a de Marto, 1954.

D-ro R.D. Loewenberg, ELNA-ano n-ro 122, famkonata psikologo, multe laboris por Esperanto, precipe en la kampo de uzado de la lingvo inter la sciencistoj.

Ili estas forpasintaj, sed longe la memoro restos ĉe ni.



JOHN BOVIT, LL.B.

## Roy Hilton

Ni bedaŭras anonci la morton de S-ano Roy Hilton, de Long Beach, Cal. la 5an de aprilo, je la aĝo de 66 jaroj. Li estis arda Esperantisto, fondinto de la Esperantista Societo de Long Beach, kaj kiel ĵurnalisto ofte trovis okazon por aperigi favorajn menciojn pri lia amata lingvo.

## ESPERANTO LEAGUE'S BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin.

### Textbooks

Esperanto for Beginners, Butler	1.10
Robbie's Home Student.	
(Recommended for quick course)	1.25
Nelson's Esperanto Course, (Complete university grade grammar and exercise book. Highly recommended.)	1.50
Step by Step in Esperanto, Butler. (Equally good as Nelson's, but different in arrangement.)	1.50
Esperanto Grammar and Commentary, Cox (Very good.)	1.50

### Dictionaries

Eng. - Esp. Vocabulary. (Not exhaustive.)	.05
Eng. - Esp. Keys. (Over 800 basic words. Good handouts.)	.05
Millidge Esperanto - English Dictionary	2.50
English - Esperanto Dictionary. Fulcher-Long.	2.35
Edinburgh Esp. Eng. - Eng. Esperanto Pocket Dict., highly recommended as a handy, dependable quick reference.	.85
Plena Vortaro. (Complete all-Esperanto Dictionary.)	4.00

### Esperanto Readers

Unua Legolibro	.50
Esperanto Legolibro. Setala. (By Esp. Academy member.)	.60

# ESPERANTO IN NORTH AMERICA

News-notes from around the United States and Canada

## Los Angeles

The accompanying group photo shows some of the members of the active *Esperanto-Klubo de Los Angeles*. Holding the Esperanto flag is S-ro Charles Chomette; behind him is S-ino Chomette; and to her left is S-ro Joseph R. Scherer, President of the club.

S-ano Dirk Brink, who sent us the photo, advises that the group meets on the second Saturday of every month at the home of S-ro Scherer, 1237 No. Alexandria Avenue, Los Angeles 29. Visitors are always welcome, and any one wishing to contact the group may do so by phoning NO rmandy 4-5103.

S-ino Dianto Farnsworth was a participant on Groucho Marx's program, "You Bet Your Life", heard over radio on May 19 and seen on television the following day.

S-ro Joseph Scherer was a guest on the same program two years ago.



S-ino Dianto Farnsworth



*Esperanto-Klubo de Los Angeles*



## Warwick, R. I.

A Warwick High School student has joined the ranks of those who have "invented an international language". The language, which is called "Monstreti", is the creation of Arthur C. Pike, 14, who says his language is "un Experimentaz in humanelero Interkennanzer" (an experiment in human relations). In a letter to young Pike, S-ro Louis Dormont, General Secretary of ELNA, suggested that the problems encountered in the creation of "Monstreti" peculiarly qualify its inventor to appreciate the simple, straightforward and logical construction of Esperanto. Dormont urged Pike to study Esperanto during the Summer. We feel sure that if this advice is followed, Arthur will soon become an ardent booster of Esperanto as the most practical solution to the language problem.

## New Classes

New Esperanto classes are reported to have been formed in the following places: Los Angeles, Newark, Philadelphia; Placerville, Calif.; North Central College, Ill.; and Troy, Alabama.

# ESPERANTO ★ TUTMONDE

laŭ aranĝo kun HEROLDO DE ESPERANTO



## Oficiala Komunikilo.

Adreso: Poŝtfolio 140,  
Haarlem, Nederlando.  
Banko: Rotterdamsche  
Bank, Haarlem.  
Poŝtĝirkonto: 604997.

Statistiko (ĝis 30-a de aprilo): Alĝerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 10, Belĝujo 52, Brazilo 3, Britujo 277, Danujo 71, Finnujo 50, Francujo 236, Germanujo 260, Hispanujo 12, Indonezio 1, Irlando 5, Italujo 79, Japanujo 1, Jugoslavio 96, Kanado 4, Madejro 1, Maroko 1, Meksiko 2, Nederlando 614, Norvegujo 108, Novzelandio 12, Portugalujo 7, Svedujo 271, Svislando 37, Turkujo 2, Usono 11. Sumo (el 28 landoj) 2226. (Multaj aliĝoj ankoraŭ ne estas listigitaj pro teknikaj kaŭzoj.)

MASON STUTTARD,  
Konstanta Kongresa Sekretario.

## La Verda Stelo en Centra Ameriko.

Dank' al la lerta agado de s-ano Tibor Sekelj kaj fervora daŭriga laboro de mez-amerikaj esperantistoj, grandparte novaj samideanoj, la Verda Stelo etendas sian brilon pli kaj pli super la respublikoj de Centra Ameriko.

En *Gvatemalo* aperas kvaronjara „Mez-amerika Revuo“, eldonata de Gvatemala Esperanto-Asocio. En la sidejo de la Asocio en la ĉefurbo Guatemala oni aranĝis konstantan ekspozicion. Oni pensas pri la organizo de unua kongreso de mezamerikaj esperantistoj.

En *Honduraso* fondiĝis dum marto Hondurasa Esperanto-Asocio; Esperanto-kurso en la universitata urbo Tegucigalpa gvidas s-ano Tany Viana.

En *Kostariko*, kie jam antaŭ trideko da jaroj konata lingvisto Carlos Gagini gvidis Esperanto-kurson, regas nun vigla intereso por nia afero. Ni jam raportis pri la fondiĝo de Kostarika Esperanto-Asocio kaj ĝia ekskurso al la vulkano Irazu (Heroldo de 16.2.54). Pasintan vintro en la ĉefurbo San José gvidis kurson s-ano Hector Fernández. Ankaŭ en la urbo Heredia funkciis kurso, gvidata de s-anino M. J. Vargas, kaj fondiĝis Esperanto-centro.

En *Nikarago* nova vizito de T. Sekelj revigligis la Nikaragvan Esperanto-Asociation, fonditan antaŭ du jaroj. En la tiea ĉefurbo kaj en universitata urbo León ekfunkciis kursoj, gvidataj de s-ano J. J. Medina.

En *Salvadoro* komenciĝis du Esperanto-kursoj pasintan januaron en la Universitato de la ĉefurbo San Salvador kaj fondiĝis Salvadora Esperanto-Asocio, sub prezido de Prof. M. A. Cobos.

## Trilanda renkonto.

La 16-an de majo renkontiĝis en la germana limurbo *Aachen* pli ol 100 geesperantistoj el Belĝujo, Nederlando kaj Germanujo. Oni travivis belajn horojn, kaj en la posttagmezo oni faris promenadon tra la urbo, por rigardi la vidindaĵojn. Tiuj renkontiĝoj jam havas tradicion, ĉar ili jam okazis antaŭ tridek jaroj. Certe ili estos ripetataj ankaŭ en la venontaj jaroj.



## Kvin Esperanto-generacioj dum malpli ol kvin jaroj.

Antaŭ ĉ. 4½ jaroj finiĝis en Beograd, la ĉefurbo de Jugoslavio, Esperanto-kurso de s-ano M. Saponjić (sur la supra foto la unua de maldekstre). Unu el liaj lernantoj estis Ilija Grahovac (dua de maldekstre). De li lernis Esperanton antaŭ 2½ jaroj S. Budimir (meza). Ĉi tiu anoncis la 1-an de decembro 1952 sian kvaran kurson. Ĝin aliĝis 50 personoj, inter ili kolonelo Antonije Sekelj (dua de dekstre), frato de nia konata samideano kaj esploristo Tibor Sekelj, kaj lia filino Ljiljana. Ambaŭ nun mem estas kursgvidantoj, kaj Gordana Ristić (unua de dekstre) estas unu el la lernantinoj en iliaj kursoj. Kolonelo Sekelj verkis ankaŭ Esperanto-lecionojn per Radio Beograd, kaj laŭ lia propono oni postulas enkondukon de Esperanto en la lenjejoj.

## La seminario por Cseh-instruistoj

(29.-31.7.) okazos en „Rijksweekschool voor Onderwijzers“ (Regna Instruista Seminario), Leidsevaart 220, Haarlem. Ĝi staros sub rektoreco de s-ro J. van der Meulen, direktoro de la nomita seminario, kaj estos gvidata de s-ro Andreo Cseh mem. La lecionoj okazos dum ĉiuj tri tagoj je 10-13 kaj je 15-18 h; la vesperoj estos liberaj. La kurso certe okazos, ĉar jam aliĝis sufiĉe multaj personoj. Pluajn aliĝojn akceptas Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. (Kotizo 24 Steloj; 40 Steloj por du personoj de unu familio.)

## Malavareco kaj sindonemo.

Nia samideano *William E. Baff*, fame konata kiel advokato en Washington, faris al UEA la proponon partopreni la delegitaron esperantistan al la Unesko-Konferenco en Montevideo. Li ne nur pagos siajn vojaĝ-kostojn por iri kaj reveni sed ankaŭ siajn proprajn elspezojn dum sia oktaga restado en Montevideo.

Lia ofero estas des pli grava, ĉar li parolas la lingvon mem de Unesko kaj ĉar li, kiel advokato, bone scias diskuti kaj trovi la taŭgajn argumentojn. Li estas vera pioniro. Dankojn al li! G. DRONCHAT.

## Gaja popolo internacia en Konstanz.

Antaŭ la Harlema Kongreso (24.-30.7.), por la tria fojo kunvenos en Konstanz ĉe la lago Bodensee gesamideanoj diversnaciaj por kune studi kaj kune ekkursi kaj distriĝi. Perfektigint Esperanto-kurson gvidos instruisto H. Müller. Oni faros du tuttagajn ŝipekskursojn: al aŭstria Bregenz, kaj al svisa Schaffhausen (falego de l' Rejno); oni vizitos insulon Mainau (sveda posedajo), prahistorian surfostan domaron, barokan katedralon, mezepokan kastelon ktp. Entute tre alloga programo. Petu ĝin de la aranĝanto: IFS (s-ano Michel Schmidt), Grüngang 8, Konstanz, Germanujo.

## Konkurso por belarta statuo sur Esperanto-placo en Gotenburg.

Konvena propono pri belarta statuo, kiu dekoru la novan Esperanto-placon en la sveda havenurbo Gotenburg, estas serĉata. La placo, la unua Esperanto-placo en Skandinavio, situas en moderna kaj vige trafikata urboparto. (La proksimuman aspekton de tiu placo post ĝia preĝejo ni publikigis en nia pasinta numero. — Red.)

Per tiu ĉi alvoko ni turnas nin al ĉiu kapabla artdesegnisto kaj skulptisto petante pri helpo. Helpu nin, per viaj ideoj, sugestoj aŭ pozitiva projekto kiel eble plej efektive ornamu tiun placon! La statuo esence simbolicu la universalecon de Esperanto, sed ankaŭ estu alloga el estetika vidpunkto. La tuta materialo estos ekspozicie prezentata kaj de fakuloj juĝata. La venkinta projekto por ĉiam honoros la artiston.

Por ke ankaŭ ne-eŭropanoj povu partopreni, ni etendigas la konkurstempojn ĝis la fino de decembro 1954. La materialo estu sendata al: Esperanto-Statuo, Box 11035, Göteborg 11, Svedlando.

(Estas konsilinde, publikigi pri tiu ĉi konkurso ankaŭ en kiel eble plej multaj neesperantistaj gazetoj, tagjurnaloj, artrevuoj ktp.)

## KELI konferencos en Oosterbeek.

Tuj antaŭ la Universala Kongreso en Harlema, Kristana Esperantista Ligo Internacia konferencos en la sama lando. De 24.7. ĝis 31.7. matene la anoj, simpatiantoj, interesiĝantoj estos kune en la bela konferencejo „Pietersberg“ en Oosterbeek apud Arnhem. Temoj, diskutoj, ekskursoj, distrajoj, promenadoj ktp. apartenas al la varia programo de la renkontiĝo. Arnhem situas en la belegaj ĉirkaŭaĵoj de la orienta parto de Nederlando, kaj la rivero Rejno fluas laŭlonge de la urbo. Por akiri informojn pri kondiĉoj ktp., oni sin turnu al s-ro A. Storm, Goudsbloemstraat 13 c, Vlaardingens, Nederlando.



### La Administra Komitato (Estraro) de Brita Esperantista Asocio.

Brita Esperantista Asocio (BEA) estas unu el la plej solidaj esperantistaj landaj asocioj, kaj ĝiaj gvidantoj ĉiam sciis adapti sian fervoron kaj entuziasmon por nia afero al la postulo de la sobra realeco. La supra foto montras ĝian Administran Komitaton („Executive Committee”). De maldekstre, starantaj: J. W. Leslie, sekretario; C. C. Goldsmith kaj D-ro C. M. Bean, komitatanoj; E. D. Durrant, komisiito por „eksteraj aferoj” (publikaj rilatoj); sidantaj: W. M. Goodes, honorofica sekretario; B. E. Long, honorofica ekssekretario; W. A. Gething, prezidanto; A. Venture, kasisto; s-ino E. Warren, komitatano. Escepte de la sekretario, la membroj de la komitato estas honoroficaj, elektitaj de la membraro en la konsilantaron, kiu mem elektas (escepte de la prezidanto, hon. sekretario kaj hon. kasisto) la ceterajn komitatanojn de la estraro. Ĉiuj oficoj, escepte de tiu de la sekretario, estas sensalajraj. S-ro Long, la honorofica ekssekretario (post 40-jara fidela servado!) fariĝis en majo 75-jara, kaj postfeste ni prezentas al li niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn. Kaj al BEA, kiu ĵus havis en Manĉestro sian 38-an Kongreson, ni deziras pluan laŭcelan agadon por nia afero ĝis la fina venko.

### Harmonia renkontiĝo inter Okcidento kaj Oriento.

Ke nia Esperanto estas ne nur komprenilo inter ago de diversaj nacioj, sed ankaŭ lingvo, kiu kunigas homojn de disigitaj partoj de sama popolo malgraŭ ĉiuj bariloj, tion spertis dum kvar tagoj de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo pli ol 40 gejunuloj en Berlino. En tiu urbo, mem dispartigita en du sektorojn, Germana Esperanto-Junularo por la unua fojo aranĝis interzonan junular-renkontiĝon kun kulturaj celoj. Unika renkontiĝo ĝi estis, ĉar pro la situo de Berlino meze en la soveta zono de Germanio por la unua fojo multaj junaj gesamideanoj sukcesis partopreni, kvankam ili devis apliki ruzan manieron por ebligi la malpermesitan vojaĝon al okcidenta Berlino. Tamen niaj idealismaj gesamideanoj ne timis iujn danĝerojn. Estis por ili preskaŭ la sola ŝanco, nuntempe ĉeesti esperantistan kunvenon, renkontiĝon post multaj jaroj de absoluta izoleco kun esperantistoj el okcidenta Germanio.

Vere estis emociaj momentoj, kiam en okcidenta Berlino junaj homoj el la oriento kaj okcidento de Germanio unuafoje interprenis la manojn, — momentoj, kiujn neniu forgesos iam. Tondra aplaŭdado akceptis kaj ĉiam denove interrompis la reprezentanton de niaj orientgermanaj gemikoj, kiam li dum la solena malfermo de la renkontiĝo salutis la gesamideanojn el okcidenta Germanio. Flue kaj entuziasme li parolis en Esperanto, malgraŭ tio ke jam de pli ol kvin jaroj ne plu ekzistas ebleco en la soveta zono ekzerci nian lingvon.

Salutparolis por la junularo de okcidenta Germanio reprezentantoj de Germana Esperanto-Junularo, Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo, Esperanto-Junularo Berlin kaj Esperanto-Ligo Berlin. Reprezentanto de la ĉefa junular-oficejo de Berlino, kiu ĉeestis la inaŭguran solenon, per laŭdaj vortoj varme dankis al Germana Esperanto-Junularo pro ĝia iniciato okazigi tian renkontiĝon tutgermanan, kiu servu konservi la kontakton kaj la amikecon inter

la junularo de ambaŭ partoj de Germanio malgraŭ la Fera Kurteno, disiganta ilin.

Riĉa programo plenigis la tagojn de la renkontiĝo. Filmoj, i.a. pri la historio de Berlin kaj pri ĝia rekonstruo post la milito, estis projekciataj. Nia egipta samideano Tador Megalli ege interese referatis pri sia hejmlando kaj popolo. Grandioza festvespero, kiun partoprenis pli ol cent gastoj esperantistaj, estis aranĝata okaze de la renkontiĝo. Belaj ekskursoj konatigis la partoprenantaron kun la verda ĉirkaŭaĵo de la granda germana metropolo. Multaj vidindaĵoj estis komune vizitataj. Tre interesa ankaŭ estis ekskurso al la fama Berlina Zoologia Ĝardeno. Kompreneble ne mankis referaĵoj pri esperantistaj kaj junularaj problemoj, kiujn sekvis regule viglaj kaj fruktodonaĵoj diskutadoj. Unu el la kulminpunktoj de la programo estis komuna vizito al prezentado de „Elektra”, teatraĵo de Jean Giraudoux, en Schlosspark-Theater, unu el la plej famaj scenejoj de Berlino. Invitis tien la partoprenantaron de la junulara renkontiĝo la ĉefa junular-oficejo de Berlino, kiu ankaŭ alimaniere kaj finance kaj morale subtenis la klopodojn de la aranĝintoj.

Plej neforgesebla travivaĵo tamen por ĉiuj estis granda kaj forta amikeco, kiu ligis la gesamideanojn el ambaŭ Germanioj. Estis amikeco, kiu konas nek zonajn limojn nek „malvarman militon”, kiu disigas la germanan popolon laŭ la opinio de la politikistoj Pro tio kun entuziasma aplaŭdo ĉiuj substrekis la salutmesaĝon, kiun nia samideano D-ro Drees, ministro-prezidanto de Nederlando, direktis al la interzona renkontiĝo. Precipe por la finaj vortoj de sia letereto D-ro Drees esprimis tion, kion sopiras ĉiuj, kiuj ĉeestis en Berlino: „Estiĝu baldaŭ por vi la ebleco, daŭre en unueco kunlabori je la rekonstruo de via lando, kiel parto de komuneco de liberaj kaj pacamantaj popoloj.” Jen vortoj, kiujn multaj rememoris, kun larmoj en la okuloj lastfoje premante la manojn en la adiaŭa horo. Tiam ili forveturis. Unuj orienten — aliaj okcidenten. Kaj inter ili estas la Fera Kurteno.

### Brazilaj samideanoj kuraĝas.

En Rio de Janeiro fondiĝis jam antaŭ iom da tempo Kooperativo de Esperantistoj por la presado kaj eldono de Esperantaj libroj. Nun la Kooperativo aĉetis etagan apartamenton en granda konstruaĵo „Edifício Itu” (apud Tabuleiro da Bahiana, Largo da Carioca, en la centro de la urbo). La apartamento havas surfacon de ĉ. 70 kvadrataj metroj, kaj la aĉeto postulas la sumon de pli ol unu miliono da kruzeroj, pagotaj poparte, laŭ kontrakto. Antaŭ ne longe la Kooperativo eldonis la dramon „Ivan VI”, originale verkita en klasika formo kaj perfekta Esperanto de juna talenta aŭtoro Geraldo Mattos. (Vidu Heroldon de 1.4.54.)

En San Paulo fondiĝis sub la nomo „Esperanto” la unua sporta (voli-pilka) trupo esperantista en Brazilo, al kiu jam aliĝis areto da sportemaj fraŭlinoj, membrinoj de la klubo „Zamenhof”.

### Svedaj KELI-anoj jarkunvenis.

La 1-an de majo kolektiĝis en Gotenburgo proks. 65 svedaj anoj de Kristana Esperantista Ligo Internacia por enlanda jarkunveno; la pritaktojn gvidis A. Wallin. Inĝ. Henry Lundin novektiĝis prezidanto de la sveda KELI-sekcio, kiu nuntempe havas ĉ. 400 membrojn. Sekretariino restas f-ino Ragnhild Niklasson, Gjutaregatan 19, Örebro.

Post la kunsido paroladis f-ino Sylvia 3oström pri „Celoj kaj rimedoj en nia agado”. Sekvis temango, ĥorkantado kaj montrado de filmoj pri Zagreb kaj Hindujo, otitaj de la lokaj samideanoj Arne Persson kaj Bertil Zell. La postan tagon okazis Esperanta diservo en la kapelo de la Kristana Asocio de Junaj Viroj. Predikis Erik Carlén, prez. de KELI, kaj s-ino Anna Alamo-Sandgren; solkantis Henrik Alander. Komuna festmanĝo kaj rondveturo tra la urbo finis la bone aranĝitan kunestadon.

La raporto pri 1953 enhavis multajn instigajn faktojn, i.a.: 204 prelegoj de s-ino Alamo-Sandgren, longaj artikoloj pri Zagreb en la kristana gazetaro, ampleksa misado per evangelia literaturo (15.000 ekz. donace senditaj dum 18 monatoj al 57 landoj), feriojuroj kaj lokaj studrondoj, ekonomia bilanco je kr. 22.433,91 (donacoj de membroj kaj simpatiantoj kune 10.086,12 kronoj).

Inter 17-21 julio ĉi-jare okazos la kutima feriojuro de sveda KELI. Ejo estos la kristana popola alternejo de Jönköping, kaj prelegos D-ro J. Stenström, L. Vasiljeŝ kaj s-ino Alamo-Sandgren. La kosto estos kr. 70.—, inkl. de manĝado kaj loĝado. Eksterlandanoj sin turnu al la sekretariino (adreso supre) por ricevi informojn. S-n.

## HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA  
ORGANO DE LA ESPERANTO-  
MOVADO

### Prezroj en 1954:

Abono tutjara .....	\$4.00
Abono januaro-junio .....	2.50
Abono julio-decembro .....	2.00
Abono subtenanta .....	8.00
Anonceto po 25 vortoj .....	.50

### Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish  
320 West 46th St.  
Los Angeles 37, Calif.

# NOVA VIVO POR GERTRUD

## Rakonto el la realo de James D. Sayers



Mi ĉeestis la belan, multe vizitatan Kongreson de la Gernana Esperanto-Asocio en Göttingen printempe de 1949. Mi supozas, ke ĉiu el la 600 ĉeestintoj de tiu Kongreso memoras la solan virinon, kiu alvenis "nigre"—tio estas, senpermeso—el la rusa zono. Ŝi estis surda, ŝi estis sen okcidenta mono, kaj kelkaj personoj opiniis ŝin ankaŭ sen ĉerbo ĉar ŝi riskis malsaton, malvarmon kaj grandan danĝeron por esti dum kelkaj tagoj inter samideanoj. Mi ĝojas diri, ke tia granda amo al Nia Afero instigis la bonkorajn ĉeestantojn fari monokolekton, por ke Gertrud Kilian havu manĝaĵon, hotelĉambbron, kaj iom da mono por la reiro hejmen.

Post la Göttingen-a Kongreso mi vane atendis raporton pri ŝia sukcesa reiro, kaj post la paso de jaroj, timis ŝin mortinta.

Sed ne! Kun granda surprizo mi ricevis, frue en 1953, leteron de iu "G. Heinrich, Hines Creek, Alberta, Canada", kiu restis mistero nur ĝis mi malfermis la kovrilno. Preskaŭ nekredeme mi legis la leteron, kiun subskribis tiu sama Gertrud Kilian. Nun la feliĉa edzino de August Heinrich, kiu aligris Kanadon el Germanujo antaŭ jaroj, ŝi helpas disvolvi pioniran farmbienon en la riĉa, nova tereno de la norda Alberta provinco.

Tre komplete ŝia letero priskribis la aventuro-plenan vivon antaŭ, dum kaj post la militjaroj 1939–1945. Pri la postmilitaj spertoj ŝi diras:

"La jaroj 1947-1948 estis la teruraj malsataj jaroj. Oni povis vidi la ostojn pro tro da malsato. Multaj homoj mortis pro tio, kaj mortfrostiĝis pro manko de karbo. Vestajoj, ŝuoj, kudriloj, fadenoj estis preskaŭ neaĉetebblaj.

"Tun tagon mi ricevis libreton pri la povo de pensoj. Mi aplikis tion, kaj post sep monatoj mi estis tute alia homo. Ĉiuj timoj, deprimo, malgajeco, k.t.p. malaperis. Mi eĉ faris paroladojn pri Esperanto antaŭ pli ol sesdek personoj.

"Mi havis 37 gekorespondantojn en 17 landoj. Unu el tiuj plej ŝatataj korespondantinoj estis en Anglujo, kaj ĉar ŝi intencis ĉeesti la 1949-an Göttingen-Kongreson, mi decidis, ke mi nepre, spite de ĉiaj obstakloj, devos iri al Göttingen.

"Mi veturis ĝis la limstacio, sekvis kvar virinojn kiuj iris rapide trans la limon. Pro mia peza kofro mi ne povis sekvi ilin. Baldaŭ mi estis tute sola en la fremda arbaro. Mi erarvagadis pli ol du horojn, malespere plorante. Finfine mi renkontis unu virinon. Ni ŝteliris kelkajn horojn, finfine atingis la teron de la brita zono. Mi baldaŭ alvenis en Göttingen al la Kongreso, iom malfrue, sed feliĉega nur pro la ĉeesto, por mi la unuan fojon, inter granda nombro da gesamideanoj. Tamen, unu granda malfeliĉo: mia angla amikino ne povis ĉeesti!



"Post la kongreso mi reveturis ĝis la limstacio. Estis pluvega vetero. Mi ne posedis pluvmantelon nek ombrelon. Baldaŭ mi estiĝis tute malseka. Mia kofro el kartono kurbigis; mi timis, ke ĝi disiĝos. Mi renkontis virinon kaj ni ambaŭ ŝteliris kliniĝante, silente, timeme ĉirkaŭrigardante tra la arbaro. Ni venis al rivereto. Mi ĵetis mian kofron trans la akvon kaj saltis, sed ne sufiĉe; akvo ŝprucis sur miajn femurojn. Malseka supre, malseka n.alsupre! Kvazaŭ tio ne estis sufiĉe da malbono, ni tiam aŭdis voĉon krei: 'Halt!'

"Terurigita, ni devis iri al la vokinato. Tie estis de ekstere ne videbla ejo kun telefono, pafiloj, teleskopo, radio kaj—rusoj! Ni devis sekvi unu rusion dum pli ol duona horo ĝis ni atingis centrejon en granda kelo. Post mallonga tempo eniris ruso kiu ordonis, ke ni purigu kelkajn lokojn. Post du horoj ni sidis ree en la kelo. Ruso eniris, rigardis nin kaj finfine diris, 'Gut, gehen!' ('bone, iru!') Ĝojege ni forlasis tiun kelon, atingis la stacidomon kaj veturis hejmen.



“Dum 1950 la laboroficejo diris al mi ke mi devos labori en fi-fama minejo, kaj ‘tuj!’ Kion fari? Mi ne volis helpi mortigi miajn kunhomojn per tia milit-prepara laborado. Tiam amiko diris al mi: ‘Malaperu! Vopo (popolpolicisto) volas aresti vin.’ Do mi fuĝis al okcidenta Berlino, kie mi erarvagadis kelkajn semajnojn, ofte ne sciante kie mi dormos vespere. Mi tranoktis sur benko aŭ seĝo en policejo, aŭ en ‘bunkero’ kun fremdaj homoj. Tiam, dum duona jaro mi estis ĉe unu familio kie mi devis laboregi sen pago, kaj finfine mi disrompiĝis. Ĉe alia familio, ree ĉe virino mi laboregis. Fine oni min akceptis en azilo por fuĝintoj. Tie estis malagrablege: geedzoj, fraŭlinoj, infanoj, ĉiuj en unu loko; litaĉo apud litaĉo sur pajlsako sen lit-tolajoj; ĉirkaŭe malespero, klaĉado, kalumnio.

“Mi skribis al ‘Allianz-Korespondenz’ kaj baldaŭ mi ricevis leteron de la homo, kiu estas nun mia edzo. Li skribis: ‘ĉripensu, antaŭ ol vi forlasos Germanujon!’ Mi respondis, ‘For, for, for de ĉi tiu malfeliĉa Orienta Germanujo, plejeble baldaŭ!’... Li serĉis edzinon, mi serĉis novan hejmon; do finfine, la 20-an de novembro, 1951, mi forlasis Berlinon per aeroplano.

“Kvaronan horon antaŭ ekflugo, konatino el orienta Berlino venis al mi: ‘Estu feliĉa, ke vi ekveturos. Vopo estis hieraŭ ĉe mi kelkajn horojn kun la intenco aresti vin.’ Timplena pro la danĝero al geamikoj, mi ploris. Sed amikoj konsilis: ‘Ne ploru, sed estu ĝoja ke vi forflugos en la liberecon anstataŭ al Siberio. Danku Dion!’

“La 22-an de novembro, 1951, mi enŝipiĝis en la belega ‘Gripsholm’. Kaj post la vojaĝo transatlantika, ni alvenis —la 1-an de decembro— en Halifax. Unutagan vojaĝon al Montreal per luksa vagonaro, kaj post kvartaga restado tie, ree okcidenten al la vasta lando de ebenaĵoj, tiam de Winnepeg nordokcidenten, kvar tagojn al norda Alberta. Ĝi estas vastega, terurige senlima lando, sed ho! kiel bela ĝi estas pro la libereco kaj la oportuno labori kaj ricevi rekompencan — kaj ne eksalti pro timo kiam iu frapas sur la pordo!

“Du staciojn antaŭ mia cel-stacio, eniris serĉanta viro. Ni tuj ekkonis unu la alian; li estis mia neniam antaŭe vidata fianĉo. Alveninte ĉe la fina stacio, ni tagmanĝis en restoracio, tiam ni iris al modesta domo. Estis kelkaj personoj tie. Iu viro parolis dum mia fianĉo kaj mi staris kune. Mi ankoraŭ ne sciis, kio okazas, sed fidis al mia fianĉo, ke ĉio estas en ordo. Tiam mi

devis subskribi mian nomon. Mi supozis, ke estis ia moro ke oni subskribu la nomon post alveno. Mia fianĉo donis al mi Novan Testamenton. Ankoraŭ ne sciante la signifon de tiuj okazoj — pro surdeco kaj nescio de la angla lingvo — mi diris, ‘Jes, mi havas ankaŭ Bibliion.’

“Tiam ni veturis per aŭtomobilo al mia nova hejmo, kiu kuŝas mejlojn for de la plej proksima malgranda urbeto, eĉ kilometrojn for de la plej proksimaj najbaroj! Nur poste, tie survoje, mi eksciis, ke mi estas jam edziniginta. Mia edzo ne volis embarasi min, laŭte

kriante tie en la domo de la pastro por klarigi ĉion al mi.”

Gertrud finis sian rakonton: “Farmlaboro treege plaĉas al mi. En ĉi tiu izolata, flanke kuŝanta regiono en norda Alberta provinco de Kanado, mi trovis min mem kaj bone refreŝiĝis korpe, anime, nerve. Nun mi havas liberecon, bonegan edzon, kaj propran hejmon. Mi stas feliĉega!”

Stranga, aventur-plena eliro, kaj komenco de tute nova vivo por Gertrud Kilian, al kiu ni esperas longajn, feliĉajn jarojn en la nova hejmlando.

## LA TAGO FINIĜIS

Henry Wadsworth Longfellow

La tago finiĝis: la luno,  
Kun la veno de l' nokto, palas:  
Kaj la noktaj ombroj, ŝvebe,  
Kiel plumo de aglo, falas.  
La lumojn de la vilaĝo  
Nebulo kaj pluvo kovras:  
Min kaptas sento malgaja,  
Kiun venki l' animo ne povas:  
Sento sopira, malgaja,  
Sed kun dolor' ne parenca,  
Kiel same nebulo  
Estas de pluv' diferenca.  
Legu, do, iun poemon;  
Sed ĝi estu simpla kaj kanta,  
Kiu faros l' animon trankvila,  
La zorgojn de l' tago pelanta.  
Ne de la gloraj majstroj,  
Nek de la grandaj aŭtoroj  
Kies paŝoj eterne sonas  
Tra la tempo-koridoroj,

Ĉar kiel marsa muzike,  
Ties grandiozo  
Pensigas laboron kaj penon.  
Sed sopiras mi al ripozo.  
Elektu poeton humilan,  
Kies kantoj fontas de l' koro  
Kiel ŝprucas de l' nuboj pluvo.  
Aŭ sur la vangon ploro:  
Kies tagoj laborplenaĵ  
Kaj noktoj sen kvieto  
Ne senigis de muziko  
L' animon de l' poeto.  
Ĉar tiaj kantoj efikas  
Trankvilige al la koro,  
Kiel preĝo, kiun sekvas  
Benanta Di-favoro.  
Elektu, do, kaj legu  
La poemon de via volo,  
Kaj aldonu al ĉiu verso  
La belon de via parolo.  
La muziko plenigos la nokton,  
Kaj kiel ĉe beduenoj,  
Silente, forire, faldiĝos  
La tenoj de miaj ĝenoj.

Tradukis D. B. R.



„Kun aproba antaŭparolo de Raymond Schwartz, kun multege da anekdotoj pri vere amuzaj situacioj, kun trafaj vortbildoj pri scenoj ĉerpitaj rekte el la vivo.... ĉi tiu verko devus doni grandan kontenton al la Esperanta publiko. Mi efektive estas certa, ke granda nombro da homoj legos ĝin kun ĝuo. La aŭtoro disponas brillan kaj kolorplenan idiomon.... Nenio simila al ĉi tiu verko antaŭe aperis en Esperanto....

Volumo bele produktita, preskaŭ sen preseraroj.”

Mason Stuttard en „Esperanto” de UEA.

*Kredu min, Sinjorino!* de Cezaro Rossetti estas libro 260-paĝa, tuttote bindita, kun ora surpriso, kaj kostas nur gld. 5.40, plus 10% por sendkostoj. Eldonita de Heroldo de Esperanto; mendbla ĉe la Esperanto-libroservoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe la eldonejo.

# NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



## Dua Movimento

### Skenco

“Ŝajnas al mi, ke ni amerikaj komponistoj jam fariĝis pli kaj pli memfidaj: mi mem scias, ke mi ne plu sentas la bezonon elserĉi konsciajn amerikanismojn. Pro tio, ke ni tie ĉi loĝas kaj verkas, ni povas esti certaj ke, kiam nia muziko estos matura, ĝi estos ankaŭ laŭkvalite amerika.”

Aaron Copland naskiĝis en Brooklyn, la 14an de novembro, 1900. Lia familio ne elstaris muzike, kaj lia propra muzika edukado ne komenciĝis ĝis li atingis la aĝon de 13. Post studado de la piano, harmonio, kaj komponado, li vojaĝis al Parizo en 1921 por studi kun Nadia Boulanger. Returninte al Novjorko en 1924, li gajnis la atenton de Serge Koussevitsky, kies protektato li fariĝis. Multaj gravaj Copland-komponaĵoj estis unue prezentitaj de la Boston-simfoniorkestro sub la kontrolo de ĝia eminenta direktoro. Estas parte pro tio, ke oni hodiaŭ prezentas la komponaĵojn de Copland pli ofte ol de aliaj samtempuloj; komponaĵojn kiel ekz. “El Salon Meksiko”, “Billy the Kid”, “Lincoln-Portreto” kaj “Rodeo”, kiuj reprezentas entute la amerikan scenon, sen la ajn influo de fremda aŭtoritato.

S-ro Copland povas fieri, ke li estis la unua komponisto kiu ricevis porstudan enspezon de la fonduso Guggenheim (1925-27). Li aktivis kiel prelegisto ĉe la “Nova Skolo por Socia Esplorado” kaj lia intereso pri samtempa muziko evidentiĝas per lia respondeco, asocie kun Roger Sessions, pri la Copland-Sessions koncertoj, kiuj prezentis programojn de muziko de burĝonantaj komponistoj. Estante membro de la fakultato de la “Berkshire-Muzikcentro” ĉe Tanglewood, Lenox, Mass., hejmo de la Boston-simfoniorkestro, li verkis artikolojn por muzik-gazetoj kiel ankaŭ kelkajn librojn.

Unu el la plej elstaraj komponaĵoj de Aaron Copland estas “Appalachian Spring”. En la originala partituro por 13 kord-instrumentoj, tiu ĉi muziko estis unue aŭdata en Novjorko la 14an de majo, 1945, kiam Martha Graham kaj ŝia kompanio prezentis la novan baleton samnoman ĉe la Nacia Teatro. Tuj poste Copland komencis ĝin adapti por simfoniorkestro, en formo de oksekcio, retenante ĉiujn el la esencaj trajtoj, kaj ellasante nur tiujn sekciojn de la baletoj, kiuj rilatas la koreografion.

La baletoj koncernas pioniro-celebron printempan ĉirkaŭ nove konstruita farmdomo en la montetoj de Pensilvanio dum la frua parto de la lasta jarcento. La edziniĝonto kaj la juna farmedzo ludas la emociojn, ĝojplenajn kaj antaŭtimeajn, kiujn invotas la nova hejma kunuleco. Pliaga najbaro foje sugestias la solidan konfidencon de l’sperto. Revivalisto<sup>☆</sup> kaj lia sekvantaro rememorigas la novajn dom-okupontojn pri la strangaj kaj teruraj aspektoj de l’homa sorto. Ĉe la fino, tamen, la genovuloj estas lasitaj kvietaj kaj fortaj en la nova domo. Estas tute simpla, hejmea kaj dediĉita, kaj oni devus multe serĉi por trovi pli beligan verkon.

En majo de 1945, “Appalachian Spring” ricevis kaj la Pulitzer-premion por muziko kaj la premion de la “Rondo de Muzikkritikistoj” de Novjorko por la plej elstara teatra komponaĵo el la sezono 1944-45. Artur Rodzinski prezentis ĝin je la 4a de oktobro, 1945, ĉe la unua koncerto de la Novjorka simfonisezono. Copland mem ĝin priskribas: “La muziko adaptita el la baletoj entenas la sekvantajn sekciojn, ludatajn seninterrompe: 1. *Tre malrapide*. Prezentado de la pensararo, unu post alia, en pala lumo. 2. *Rapide*. Eksono

de unisonaj kord-instrumentoj komencas la agadon. Sentimento, kaj gajiga kaj religia, klarigas la scenon. 3. *Moderato*. Dueto por la fianĉino kaj ŝia destinulo — sceno de dolĉeco kaj pasio. 4. *Tute rapide*. La revivalisto kaj lia sekvantaro. Folkeca sentado, kamparo-violonistoj kaj dancoj. 5. *Ankoraŭ pli rapide*. Soldanco de la fianĉino. Antaŭseno de patrineco. Ekstremoj de ĝojo, timo kaj miro. 6. *Tre malrapide*, kiel ĉe komenco. Sceno rememoriga de la enkonduko. 7. *Kvieto kaj flua*. Scenoj de tag-aktiveco por la novuloj. La subjekto, ludita per soloklarineto, devenas el kolekto de melodioj “Shaker” (“Skuantoj”: religia sekto, tiel nomata pro iaj movadoj en dancado, kiu formas parton de la adorado). 8. *Moderato*. Finaĵo. La edzino viciĝas inter la najbaroj. Je la fino la paro restas “kvieto kaj forta en la nova domo”. Dampitaj kord-instrumentoj intonas dolĉigan, preĝecan melodion, kaj la komencan denove rememorigas la konkludo.

En sia libro “Nia Nova Muziko”, Aaron Copland, diskutante i. a. la neceson, ke la komponisto konatiĝu kun la problemoj kaj eblecoj de la hodiaŭo, konstatas, ke “komponistoj dum la lastaj dek jaroj iom post iom realiĝas; tute nova publiko aŭskultas la muzikon, t. e., la muzikon de la radio kaj la fonografo. La disvastigo de bona muziko — per la radio — inter milionoj da novaj aŭskultantoj certe faras profundan efektan. Por la unua fojo demokrateco eniras la regnon de serioza muziko. Tiu ĉi estas ekscita fakto, kiu poste ŝanĝos ĉiun fazon de nia muzika vivo! La demando estas: Ĉu la modernaj komponistoj povos verki muzikon, kiu interese la ĝis nun netuŝitajn milionojn, kaj se jes, kian muzikon oni komponu? Sendube komponistoj ne povos plen-





Represita kun permeso el "Belga Esperantisto":

## IMPRESOJ PRI USONO \*)

### Kelkaj postvoĵagaj notoj

Kiam nia avo rakontis al ni pri „sia” malnova tempo”, ni penis revivi en nia imago la bildojn de tiu pasinteco. Sed, nek la priskribo de la vortoj, nek la vido al malnovaj flavigintaj fotografiaj povis, por la nuna generacio, rekrei la vivon de niaj geavoj.

Sed Eŭropano povas ja vidi la mondon kia ĝi estos por la sekvanta generacio, vizitante la Unuiĝintajn Ŝtatojn de Norda Ameriko.

Jen, jes la ĉefa, plej elstara impresio kiun oni havas, kiam oni vidas Usonon por la unua fojo: oni vidas en la estontecon!

Apenaŭ fantazieblaj urbegoj de betono kaj ŝtalo tra kiuj la rektaj stratoj estas kvazaŭ tranĉitaj, formantaj relative mallarĝajn, mallumajn profundajn fendojn en kiuj la homoj neniĝas al resignifaj mikroboj.

Ĝisfunde meĥanikita vivo, en kiu la homa energio limiĝas je butonpremo.

Salajroj tiel altaj kaj prezoj relative tiel malaltaj ke la vivnivelo estas tri, kvar kaj, kompare al tiuj en iuj pli postrestaj landoj, eble ĝis dek fojoj, pli alta ol la nia, tiel ke — laŭ niaj normoj, laboristoj ĝuas riĉulan vivon.

Enviinda kvazaŭ-foresto de senlaboreco, tiel ke trovi laboron estas proporcie pli facile ol trovi laboristojn.

Nekredeble granda federacio de 48 landoj kie oni parolas nur unu lingvon kaj kie neniu landlimo ĝenas iun ajn; nekredeble bela lando, vasta kiel kontinento, same varia kiel kontinento kaj ĉio ĉi — je ĉies ĝueblo en plena libero.

konsenti unu kun alia, sed unu fakto elstaras: la nova muzika aŭskultantaro devos havi muzikon, kiun ĝi povos kompreni. Tio ĉi estas memevidenta vero. Tial ĝi devas esti simpla kaj rekta. Nenecas do, ke tio estu barilo al la ekspluatado de ĉiuj el la novaj rimedoj eltrovitaj dum la unuaj jaroj de la dudeka jarcento.

Ne estas okazo por pikante subjektiva kantado. La amerikaj komponistoj estas la homoj, kiuj devos enkorpiigi la novajn komunajn ideojn en novan komunan muzikon!”

☆Revivalisto: predikisto, kiu gvidas publikajn, ofte sensaciajn, kunvenojn, kun la celo rekrei intereson pri religio.

La aŭtomobilo en posedo de ĉiu familio, la grandaj financaj rimedoj kaj la 40-hora semajno same kun la liberigo prezentita de 48 ŝtatoj sen la malhelpo de landaj limoj, naciaj miskomprenoj kaj diversecoj de moroj kaj lingvoj, tuto kiu estigis en Ameriko vivmanieron tiel malsimilan al la eŭropa ke ĝi kaŭzas al ni iom da kapturniĝo.

\*\*\*

Sed, ĉe lia unua kontakto kun tiu lando de nelimigeblaj ebloj, la eŭropanon ankaŭ trafas amerikanaĵoj, kiuj iom ŝokas.

Konsterniga manko de tio kion ni nomas kulturo: manko de bonmanieroj, manko de sindetenemo, manko de respekto kaj manko de modestececo.

Nekredebla disvolvado de la privata iniciatemo kaj preskaŭ kompleta apatio fare de la ŝtataj aparatoj, pro kio ĉiu devas helpi sin mem: nenia oficiala subvencio aŭ helpo ĉe sociaj malhelpaĵoj estas antaŭviditaj.

Se la Eŭropa politiko ne estas komprenebla por la Amerikanoj, ankaŭ la usona politika sistemo estas same ne sondebla por la Eŭropanoj; ĝi ŝajnas al ĉi tiuj kruda kaj ne tre demokrata. Fakte terura kaj por ni neniel

imagebla miksaĵo de krimeco kaj politiko kun la juĝistaro.

Sed se la Usonano emas fanfaroni pri siaj progresemaj efektivecoj, li ankaŭ senhezite kaj senkaŝe montras al vi la nebonaĵojn de la amerikanismo. Kio estas simpatia!

La Usonano estas surprize religiema, sed adoras monon pli ol ion ajn surtere, li estas samtempe malavara kaj egoisma, bone edukita kaj infane naiva. La junularo estas studema kaj malpli supersata ol ĉe ni; knaboj kaj knabinoj multe sportas sed ofte devas labori, eĉ tre junaj, por havigi al si poŝmonon. Mia impresio estas ke la usona junularo estas — klare kaj morale — pli bone ekipita por la posta malmilda vivo ol la nia.

\*\*\*

Mia finkonkludo?

Mi ne povas finkonkludi. Ĉu oni envere povas kompari la estontecon kun la estantecon? Ĉu oni envere povas kompari nian malnovan, kulturplenan sed disŝiritan kaj heterogenan Eŭropon kun la tutjuna, unuiĝinta kaj sentradicia Nova Mondo?

Kaj nia tasko do estu ne la esploro kaj serĉado de tio, kio plaĉas al ni en tiu nova mondo sed male la malkovro de kio estas kopiebla kaj kopiinda.

F. VAN DOOREN.

\*) La aŭtoro de ĉi tiu kontribuo restadis en 1953 dum 10 semajnoj en Usono, aviadilante de grava loko al grava loko (Red.).

### Novaj Libro

“Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj”, de Paul Neergaard. Eldonis The Esperanto Publishing Co. Havebla ĉe la Libro-Servo de ELNA. \$3.50 afrankite.

De tempo al tempo aperas libro en Esperanto kies signifo estas aparte granda por la movado — libro, kies ekzisto pliriĉigas aŭ plivalorigas la lingvon. Ĉi tiu verko pliriĉigas ĝin er



D-ro Paul Neergaard

ambaŭ sencoj. D-ro Neergaard, gvidanta aŭtoritato pri la temo, efektive prezentis al la movado verkon priferindan: ĝia plaĉa aspekto kaj ĝia serioza kaj bildo-riĉa enhavo estas konvinkigaj pri la meritoj de nia lingvo; sed, kio pli gravas, la fakula mano de la verkinto esploris kaj surmapigis virgan lingvo-terenon.

Kaj tamen restas ankoraŭ nemenciita la plej rimarkinda fakto pri la libro: ĝi reprezentas por ĉiu Esperantisto, kiu posedas ĝin, trezorejo de informoj valoraj, kiujn oni tre verŝajne ne povus trovi sur la paĝoj de iu ajn alia unu libro, eĉ nacilingva. Destinita por la serioza nefakulo, la libro instruas pri ĉiu fazo de la luktado kontraŭ la malamikoj de la ĝardenplantoj: kiel ilin rekonii, venki, eviti. Kun pli ol 80 ilustraĵoj kaj informaj tabuloj, kaj kun klaraj tekstoj, *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj* estas aparte rekomendata al nordamerikanoj, el kiuj tiom multaj ĝuas flegadi la propran ĝarden(et)on.

D.B.R

## PRACTICAL SUGGESTIONS ON SENDING MONEY ABROAD

By Donald E. Parrish

Probably no language group in the world has a greater need than the Esperantists for some simple, convenient and inexpensive method of communicating small sums of money abroad. For a number of years prior to the first World War this need was met by the unique *Ĉekbanko Esperantista* (see our previous issue).

At present, small payments may be made by means of the "International Reply Coupons", which are sold at post-offices throughout the world. Here in the United States these cost 11 cents each. When sent abroad each coupon may be exchanged by the recipient for "postage stamps representing the amount of postage for an ordinary single-rate letter destined for a foreign country". Two spaces are provided on the front of the Reply Coupon: the one to the left is used by the issuing post-office; that at the right by the redeeming office. The redeemed coupons are forwarded to the central office of the International Postal Union for the necessary accounting between the countries involved in the transaction. There is no time limit on these coupons—they are good until redeemed. They form,

therefore, a convenient although somewhat expensive medium of exchange on an international basis. The original purchaser may however turn them in at the office of issue only, in exchange for stamps at 10 cents each. (In this connection it may be well to mention that stamped envelopes, postal cards and air-letter sheets, if spoiled, are redeemed by the post-office from the original purchaser at a portion of their first cost.)

Instructions for the use of the International Reply Coupon are printed on each coupon in some seven different languages. It has long been the hope of Esperantists to have Esperanto used, as French now is, on every coupon.

Many Esperantists throughout the world are now using, instead of International Reply Coupons, the "steloj" issued by the great *Universala Ligo* in The Hague. These are 178 x 234 inches in size, printed on white paper in green, red, and light brown. *Universala Ligo* has authority from the Government of the Netherlands for the issuance and redemption of these *steloj*. The full value of the coupons in circulation is covered by funds deposited in

a bank in the Netherlands.

Like the old *spesmilo*, which had a fixed relation to the British pound (1 Sm. 2.003 shillings), the *stelo* is a fictitious money unit, but it is directly tied to the Netherlands gulden (1 St. .25 gulden).

Although the *stelo* is, in principle, redeemable only by the issuing authority, *Universala Ligo*, in exchange for membership dues, subscriptions to its excellent illustrated monthly magazine *La Praktiko*, and for books and supplies sold by them, it is in fact accepted throughout the world by most Esperantists and Esperanto organizations. They should not be sent to anyone else.

In North America the U. L. *steloj* may be obtained from the writer (328 W. 46th St., Los Angeles 37, Calif.) at 7 cents each, and they are redeemable at full value by him as agent for the *Universala Ligo* as mentioned above. Make use of these convenient and inexpensive coupons when you need to send small amounts abroad to your Esperanto correspondents, publishers, book-dealers, etc.

Beginner in Esperanto desires correspondence with beginners, any country; also interested in exchanging stamps, view cards, first-day covers. C. WALTERS, "Loombah", CUMNOCK, New South Wales, Australia.



## ADDRESS CHANGED?



We want all our mem- Name .....  
bers and subscribers to get their *Reviews* NEW ADDRESS .....  
promptly. When you .....  
move, let us know immediately so our records will be up-to-date! OLD ADDRESS ..... (Zone No.)  
Use this form or write the information on an ordinary postal card.

Mail to: *Esperanto League, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N. Y.*

## HOW TO LEARN ESPERANTO

### Part 4:

#### *Read the Bible*

After the student has mastered the grammar of Esperanto and acquired a vocabulary of the more common words, the next step is to read and read. Fortunately there is no lack of books in Esperanto suitable to all tastes.

There are many books in easy Esperanto intended for the beginner, and the student should procure several of these, and read them carefully, thereby familiarizing himself with the grammar and increasing his vocabulary. It is interesting to note how as he reads he finds that day by day the task becomes easier, until soon he is reading readily, with only occasional reference to the dictionary.

When the student has arrived at this stage, he is ready for more serious literature. "The Fundamenta Krestomatio" has been reviewed in this column and we repeat that it is the best reading matter for the student who has graduated from easy Esperanto.

It is suggested that the next book to be added to his Esperanto library be *La Sankta Biblio*. The "Krestomatio" and the Bible constitute a library in themselves.


In 1906 the magazine *La Revuo* published Zamenhof's translation of the Ecclesiastes. During the next ten years Zamenhof, who was a competent Hebrew scholar, continued his task of translating the Old Testament, which he completed shortly before his death in 1917. The translation of the New Testament was undertaken by several British clergymen. During the centuries that had elapsed since the publication of the King James Version studies and commentaries had cleared up many of the obscurities and errors contained in that version, so that considered as a translation the Esperanto text is superior to the classic translations.

The King James Version, which was made at a period when the English language was at its purest and best, is a monument of English literature, and it is fortunate that Esperanto possesses a version of the Bible of equally high value. The Bible is, as we have said, a library in itself: an anthology of the history, legends, philosophy, and poetry of the ancient Hebrew race.

It is particularly to be noticed how the Esperanto text preserves, more than the English, the poetry of the original in such books as Job, Psalms, and the Song of Solomon.

Thanks to the generosity of two English ladies—F-inoj Peckover—the complete Bible was published by the British and Foreign Bible Society. That great organization, founded in 1804, had already published the complete Bible in 145 languages, and New Testaments and other portions in nearly 500 other languages. Its total issues up to 1928 were over 385 million.

The book is beautifully printed on high grade paper and well bound. The price is very low for a volume of such high quality of workmanship.



### La plej interesa libro

aperinta ĝis nun en Esperanto  
El ĉie kaj pri ĉiaj aferoj!

Prezo \$1.65, inkluzive sendkostojn

Mendu de:

Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

### Correspondence Service

The North American Correspondence Service now has on file the names and addresses of Esperantists in almost every part of the free world who are looking for correspondents in the United States or Canada. Included are many collectors who wish to trade stamps, covers, post-cards and similar items.

S-ano Elwyn C. Pollock, director of the Service, points out that corresponding with Esperantists in other countries is one of the most effective means for beginners to perfect their command of the language and urges all Esperantists, whether beginners or not, to take full advantage of the Service.

The services of the NACS are free and are available to everyone, not just members of the Esperanto League. The address is: North American Correspondence Service, 9079 Madison Ave., La Mesa, Cal.

### Ĉu Vi Povas Helpi?

ELNA urĝe bezonas materialon por ekspozicioj. Multaj publikaj bibliotekoj, ktp. bonvenas ekspoziciojn pri Esperanto, sed la lokaj aktivuloj ne havas taŭgan materialon por elmontri. Se vi povas helpi al la kreado de vagantaj ekspozicioj, skribu al Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Ore; aŭ Helene Wolff, 2944 Clay St., San Francisco, Cal.

## LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Presentado kaj komentado de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj  
2a volumo, 1906-1914—374 paĝoj

Nuna prezo: Ĉiu volumo \$ 2.25

Mendu de:

Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

### Bona Propagando — Malgranda Kosto

Abonu la Revuon donace por altlernejoj, publikaj bibliotekoj, senatanoj, kongresanoj kaj aliaj instancoj kaj institucioj, kaj por influhavaj personoj. Per \$3.00 vi povas prezenti unujarajn abonojn al 10 lernejoj, bibliotekoj aŭ eminentuloj. Proponu tion ĉe via grupo.



**Esperanto  
and Stamps**  
by *Conrad Fisher*  
RFD1, Meadville, Pa.

The first stamps to bear text in or about Esperanto were issued by the Soviet Union. Those honoring the sixth world congress of S. A. T., the workers' Esperanto movement, are the first to bear a message in Morse code. Stamp collectors to whom I show these stamps often ask me what the relationship is between Esperanto and Communism.

Actually, of course, there is no relationship; just as there is no connection between Esperanto and any political, religious, or nationalist movements. As a neutral tongue for all men, it is not primarily a "movement" at all, but only an instrument, equally available to any who wish to use it.

At the time of issuance of these stamps by the Soviet Union, Esperanto was favored there as a means of converting the rest of the world to Communism. When those responsible for the favored treatment of the language realized the opposite effect was resulting, the leaders of the Soviet Esperantists were liquidated and Esperanto periodicals, organizations, and classes were stopped.

While Stalin was in prison he studied — along with Marx's *Das Kapital* — an Esperanto text-book. When he got control of the USSR, however, he changed his mind about Esperanto, saying it is a European language, not fit to serve the whole world. He stated that the universal language would be (you guessed it!) Russian, and therefore that it is a waste of time to study Esperanto. Communists in all countries are encouraged to learn Russian.

The fact that the Soviet Union was the first country to issue postage stamps with Esperanto texts indicates simply that the communists do not overlook any opportunity to spread their propaganda.

A special envelope will be mailed from the Congress of ELNA, bearing a cachet of the Congress. More than 125 non-Esperantist philatelists have ordered these covers at a dime apiece, to be mailed on the first day of the Congress. My aim, in handling this matter, was to reach potential new Esperantists in North America. Of course, any Esperantist interested in receiving one of these covers may do so by sending me a dime. If possible, I intend to continue these special covers at future Congresses.

In the next issue I shall talk about the next country to issue postage stamps in and about Esperanto.



## THE ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE

*Middleton, Wisconsin*

Poemoj de Omar Kajam, <i>Waringhien, paper, 60 pp.</i>	\$ .85
Historio de S. A. T., <i>paper, 152 pages</i>	1.30
Sennacieca Revuo, 1952-3-4, <i>each</i>	1.00
Aŭskultu la Voĉojn de Oceano, <i>paper, 53 pages</i>	.45
Kvaropo, <i>Auld, Dinwcodie, Francis, Rossetti; paper, 267 pages</i>	1.50
La Arto Fariĝi Centjara, <i>Wegner, paper, 59 pp.</i>	.50
Sveda Novelaro	1.50
Interpopola Konduto, <i>Privat</i>	1.00
La Gaja Podio, <i>Schwartz</i>	1.40
Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj, <i>cloth, ill., 304 pages</i>	2.50
La Bapto de Caro Vladimir Borovsky, <i>141 pages</i>	1.50
Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto, <i>Stojan</i>	.70
La Nuna Stato de l' Evoluismo, <i>Rostant, cloth</i>	1.00
Triesto al Kiu? <i>paper, 44 pages</i>	.50

*Write for complete listing*

*North American Esperanto Review*  
6205 South Prospect  
Tacoma, Wash.

Return Postage Guaranteed